

Přednáška 7.3.2018 František Horáček

Bonan vesperon, karaj samideanoj!

Mia hodiaŭa prelego nomiĝas „Ĉu ni volas serĉi aŭ la vivon nur travivi? “ Mi havas en la menso ĉefe ĉiutagan vivon de la ordinarulo. Mi demandas min, ĉu ni havas en nia ĉiutaga vivo tempon entute enpensiĝi pri ĉi tiuj aferoj? Ni vivas en ĉiutaga rapidado...ĉion pritrakti, prizorgi, plenumi, solvi, aranĝi, ekipi, instali kaj establi... kiam ni fine haltos kaj paŭzos, por ke ni povu klarigi al ni kio apartenas al vere efektiva vivo...? Kia estas la vera senco de nia alveno ĉi tien en la mondon? Ĉu estas konvene lasi ĉi tiujn aferojn al la lasta fazo, al vespero de nia vivo...?

...La temon de mia prelego mi pliriĉigis per interesaĵoj pri unu granda forto, kiu detruas dum jarmiloj la homaron ĝenerale kaj la vivon de ĉiu ordinarulo eksterordinale...Estas facile diveni, pri kio temas...

...Kie troviĝas Egipto, ĉiu scias – en la nordorienta parto de Afriko. Temas pri la patrujo de la plej antikva civilizacio en la mondo. Antaŭ tri, kvar, eĉ kvin jarmiloj, kiam en la centra Eŭropo la barbaroj vestitaj per maldelikataj feloj sin kaŝis en kavernoj, Egipto jam posedis altan socian organizon, terkulturon, metiojn kaj literaturon.

Sed precipe ĝi plenumis gigantajn laborojn inĝenierajn kaj konstruis kolosajn monumentojn, kies restaĵoj naskas admiron de la nuntempaj teknikistoj. Egiptanoj sukcesis krei tian armeon de laborantoj kaj al ĝi ili ŝuldas siajn senmortajn verkojn. Ŝajnas, ke kreis ĝin kaj poste preparis planojn por ĝi la pastroj, t.e. la egiptaj saĝuloj, kaj komandis ĝin la reĝoj t.e. la faraonoj. Tiama-niere la egipta popolo, en la tempo de sia grandeco, formis kvazaŭ unu personon, en kiu la pastra kasto estis penso, la faraono estis volo, la popolo-korpo kaj la obeo-cemento. Do la naturo mem de Egipto postulante grandan, senĉe-san kaj regulan laboron, kreis skeleton de socia organizo de ĉi tiu lando: popolo laboris, la faraono direktis, la pastroj preparis planojn. Kaj tiel longe kiam ĉiuj tri konsente iris al la celoj, montritaj de la naturo, tiel longe la socio povis flori kaj plenumi siajn eternajn verkojn. Jes, ni atentu la grandan rolon de la naturo kaj grandan asonancon inter la naturo kaj la homoj.

Tamen, kun la tempo, kiam la ŝtata konstruaĵo komencis fendiĝi, en la landon alfluis pli kaj pli multenombre fremdaj elementoj. Ili malfortigis la unuecon, disigis la socion, kaj fine superverŝis kaj dronigis en siaj ondoj la antaŭajn loĝantojn de la lando.

Hodiaŭ preskaŭ neeble estas imagi la gravan rolon, kiun ludis la pastraro en Egipto. Ili estis instruantoj de la junaj generacioj, antaŭdiristoj sekve konsilantoj de la maturaj homoj, juĝistoj de la mortintoj, al kiuj ilia volo kaj scio garantiis la senmortecon. Ili ne nur plenumis religiajn ceremoniojn ĉe la dioj kaj faraonoj, sed ankaŭ kuracis la malsanulojn kiel kuracistoj, influis la publikajn laborojn kiel inĝenieroj, kaj la politikon kiel astrologoj kaj precipe kiel spertuloj en la aferoj de la propra lando kaj de ĝiaj najbaroj.

Egipto prosperis, dum la unuigita popolo, energiaj reĝoj kaj saĝaj pastroj kunlaboris konsente por la feliĉo de ĉiuj. Sed venis epoko, en kiu la kvanto da regnantoj malgrandiĝis de militoj, la premata kaj ekspluatata popolo perdis fortojn kaj la influo de fremduloj detruis la unuecon de la raso. Kaj kiam en la azia lukso dronis energio de la faraonoj kaj la saĝo de la pastroj, kaj la du potencoj komencis batalon pri la monopolo ekspluati la popolon, Egipton ekregis fremduloj kaj estingiĝis la lumo de la civilizacio, kiu dum kelke da jarmiloj brilis apud Nilo...la trafa kaj iomete fortimigita leciono, ĉu ne? Eble vi ekkonis la fonton de tiu ĉi miaj linioj. Jes, temas pri la fama libro de Prus: La faraono.

...Ni instruiĝu ankoraŭ el la pli proksima historio. La historio estas la vivinstruanto. El la tempo pasinta ni ĉerpas instruon por la tempo venonta. El la paseo ni lernas por la futuro...sed, bedaŭrinde tio estas ĉiam la sama afero...la homoj ĝis nun tute ne estas kapablaj instruiĝi el tio...

Vi certe ekkonos la vortojn de JOHANO AMOSO KOMENIO...Kutime oni ne rebonigas tion, kio ne estas difektita. Se ni rekomendas konsulton pri rebonigo de la homaj aferoj, ni supozas, ke ili estas difektitaj. Tio certe ne bezonas penigan pruvadon, ĉar estas ĝeneralaj la plendoj, ke nenio estas sur sia loko, ke ĉio devias de la ĝusta vojo. Ĉiuj homoj vidas, ke anstataŭ saĝeco regas malklereco aŭ sofistiko, anstataŭ tolerebla politika reĝimo dominas anarkio aŭ konfuzo aŭ tiraneco. La mondo svarmas de senkleraj azenetoj, kiuj amas la te-nebron de sia nesciado, kvankam aliflanke ne mankas la homoj de la mala ekstremo, kiuj estas tro scivolemaj, tro avidaj ĉion scii, kiuj tage nokte elĉerpiĝas per studado de aferoj senbezonaĵoj. La kutimaj homaj streboj estas klopodoj akiri havaĵon, rangon kaj voluptojn. Multaj ne kontentiĝas per regado de si mem, sed ili deziregas regi la aliajn. Ili opinias plezuro, se ili povas aliajn mastri, batali kontraŭ ili, venki ilin kaj sklavigi ilin. La regantoj kutime tute ne meditas pri tio, kial ili regas. Ili pensas, ke nur por ili ekzistas la mondo, kaj ili traktas aliajn homojn kiel bestojn, misuzas ilin laŭ sia plaĉo, kaj ĉian reziston subpremas per forto, uzante vipojn, glavojn, katenojn kaj karcerojn...

...Prezentiĝas la demando kaj ni levu ĝin: Kiel nomiĝas la forto, kiu fariĝas por homaro kaj por ordinarulo fatala? Mia spirita instruisto Paulo Bruntono en la antaŭa jarcento ie skribis, ke „LA EGOISMO ESTAS SABLO EN RADOARO DE LA EVOLUO.“ Ĉi tie mi disponigas kelkajn liniojn el Vikipedio: „Oni povas rigardi ĝin kiel la radika malvirto. De ĝi venas ĉia malbono, sur la fundo de ĉiuj malvirtoj kuŝas egoismo. Egoismo estas neakordigebla kun justeco, amo kaj karitato, ĝi nuligas ĉiujn ceterajn bonkvalitojn. El ĉiuj homaj neperfektaĵoj, la plej malfacile elradikigebla estas egoismo, ĉar tiu ĉi naskiĝas la malforto de la karno de kiu la homo ne povis liberiĝi. Por la daŭrado de influo de materio ĉiu kunhelpas: leĝoj, sociaj organismoj kaj edukado. Egoismo malfortiĝos ĉe la supereco de la morala vivo antaŭ la materia vivo.“...

... Kaj la egoismo iras en historio man' en mano, brak' en brako kun la materialismo. La teorio de materialismo laŭ Vikipedio diras ke: „Ĉiuj aĵoj estas kunmetitaj de materio, kaj ke ĉiuj emergaj fenomenoj (inkluzive de konscio) estas la rezulto de materiaj trajtoj kaj interagoj. En aliaj vortoj, la teorio asertas ke nia realeco konsistas tute el fizika materio kiu estas la sola kialo de ĉiu ebla okazo, inkluzive de homa pensaro, sentaro, kaj agado. „...“

... Ni daŭrigu kun la demando „ Ĉu devas esti la evoluo de la mondo en interrilato kun la egoismo? Kaj en kia mondo ni vivas nun? Kaj kiamaniere ni volas ĉi tie vivi? Ĉu nur en la unu vizito laŭ materialistoj aŭ daŭre laŭ kelke da idealismaj skoloj? Ni povas ankaŭ enpenŝiĝi pri ĉi tiuj du ĉefaj rigardoj: materialisma kaj idealisma. Ni ne restu duonvoje. La ora mezvojo ne ekzistas! Ni ne lasu la aferojn flosi laŭflue... Ĉiu havas rajton esprimi sian opinion... Neniu naskiĝis kiel majstro, sed ĉiu povas la majstro estiĝi..

...Kia estas la materialista rigardo kaj klopodoj? Laŭ materialistoj en nia mondo regas hazardo. Ni alvenas ĉi tien hazarde. La hazardoj estas blindaj, neanalizindaj, neaŭgureblaj, neprognozeblaj...Kaj la vivoj de materialistoj estas mallongaj. Tial homoj apud la ĉiutaga penado por akiri la bona porvivaĵo kaj por plenumado de ilia ambicio elserĉadas la grandajn porciojn de ĝuoj kun celo serĉi progreson, incitojn de sencoj kaj kontentigadojn de la mensoj. Ne longe pasinta estas la tempo, kiam ili travivadis la grandajn suferojn, kiujn ili ne atendis. Ĝuste en la tempo, kiam la mondo gloris la plej grandajn venkojn super la materiaj aĵoj, tiam la monda civilizacio ŝanĝadis sin en tragedion...La homoj esperis kaj supozis, ke la paco post du militoj estiĝos daŭra kaj la nacioj iros sur la vojo de amikeco kaj interkompreniĝo. Sed la historio de postmilita mondo ne montris la ŝanĝojn de malbono al bono, sed de malbono al pli malbono. La tempo post la dua milito estas rimarkinda per senmezura streĉeco, malagrabra kaoso kaj malcerteco. Jam sepdek jarojn postsekvas la krizo post krizo kaj la fino ne estas

videbla. Ĝis nun neniam estis tiom da homoj trafitaj de tiel granda malcerteco, kaoso kaj palpaco. Militoj kaj krizoj senmaskigas teruran kapablon de malbono, kiu kaŝiĝas en la homoj spite al iliaj civilizaj eksteraĵoj. En koroj de homoj naskiĝas la demando: estas ĉi tio tiu senglora fino, al kiu proksimiĝas nia laŭdegata moderna civilizacio? Estas multaj signoj de ĉi tiu stato kaj al ĉiuj jam hodiaŭ estas evidentaj... La materialismo seniluziigis la homojn. Sed kion fari? Kia estas la plej bona defendo, kiam la homa vivo estas tiel malfacila kaj mallonga?

...Ni daŭrigu kaj observu vivon de ordinarulo, kiu en nia freneza mondo jam tute ne kredas je materialismo. Kion ni ekvidos? Ĉiutage li atendas renkonti grandan amon, li atendas renkonti sukceson, li atendas riĉiĝon, gloron, kaj se ili ne aperas, li sentas sin malfeliĉa. Kelkaj eĉ iras konsulti tiel nomataj klarvi-dantojn aŭ astrologojn, kiuj diros ekzemple al ili: „Jes ja, amo venos, sukceso trafos vin... Post ses monatoj, post unu jaro, kiam tiu aŭ tiu astro preterpasos tiun alian, kiam tiuj kaj tiuj du planedoj troviĝos kune ĉe sama longitudo, vi vidos, ĉio ŝanĝiĝos.“ Tio sekurigas: oni resentas esperon kaj atendas plu... Nu, tiel ne estas. Feliĉo ne estas io, kio venas aŭ ne, simple tiel, el ekstere. Feliĉo estas stato, kiu dependas de nia ĝusta stato. Estus erare imagi, ke ni venis surteren por vivi en facileco, plezuroj, abundo. Ni venis ĉi tien por lerni kaj perfektigi. Kaj kiel eblus perfektigi, se ne aperus ĉiutage novaj kaj novaj problemoj, kiujn ni devas solvi. Estu tute klare: La tero estas lernejo, kaj kiel en ĉiu lernejo, nur tiuj povas feliĉi, kiuj lernas kaj progresas. Ne atendu do, ke via feliĉo venos el ekstere sub la formo de renkontiĝoj aŭ favoraj kondiĉoj. Efektiva, definitiva feliĉo povas veni nur de ni, el niaj pensoj kaj agoj...

...Sed vortojn oni diras kaj ekzemploj altiras. Ĉi tie estas mia ilustra ekzemplo. Lime de la jarmilo proksimiĝis al mi kvindeko. Mi travivis tre malbonan periodon de senlaborulo. Mia sanstato ne estis bona, suferigis min krevinta stomaka ulcero. „Kia maljusteco!“, mi diris al mi, ĉar mi la tutan profesion kaj familian vivon klopodis vivi laŭ principo „Kiam vi ne povas helpi, do almenaŭ ne damaĝu.“ Mi estis malfeliĉa, samtempe ankaŭ laŭ mia opinio de ordinarulo, kaj mi sentis tion ĉiutage, io grava en mia vivo kaj ĉirkaŭ mi ne estis en la ordo. Mi estis pri nervoj jam sen rezervoj. La kvalito de la vivo pli malboniĝis, mi ankaŭ vidis, ke en rilatoj inter la homoj pli kaj pli regas mensogo kaj disrevigado. Mi ofte diris al mi, kiamaniere plenigi nian vivon per nova vivenergio? Unuspire mi sentis, ke io grava devas okazi... JES, IO FAKTE OKAZIS: mi malsaniĝis je tre unika malsano, kiu nomiĝas psiĥo-spiritala krizo laŭ la psiĥiatroj – idealistoj, sed laŭ la psiĥiatroj-materialistoj temis pri ŝizofrenio. Mi ekkonis, ke mi vivas en disŝiregita mondo. La malsano daŭris kelkajn monatojn kaj en mian vivon

alvenis mirakla ŝanĝo de paco kaj trankvilo. En mia libroŝranko mi malkovris spiritajn librojn, kiujn mi dum miaj antaŭaj tridek jarojn aĉetis. Ili helpis al mi solvi gravajn demandojn, precipe la demandojn de mia mondkoncepto. Estiĝis ankaŭ laŭvorte granda miraklo. Mi resaniĝis kaj estiĝis serĉanto iranta en la spuroj de Paulo Bruntono kaj mistikulo doktoro pri juro ĉeĥo Eduardo Tomaso. Mi ekkonis la ĉefajn principojn de nia Universo kaj kial mi estas ĉi tie sur la Tero. Jam preskaŭ dudek jarojn mi sukcese uzas rektlinion al mia senmorta spirita fundamento en mia spirita koro. Tial mi jam ne bezonas iradi al preĝejo, ĉar tio estas por mi superflua.